

RAPORTO PRI LA EKSTERORDINARA ĜENERALA MEMBROKUNVENO DE 30-JAN-2010

Komenco de la seanco je 14h30 en la kastelo Greziljono.

Prezidanto de seanco: Claude Nourmont

Sekretario de seanco: Jannick Huet-Schumann

Reviziantoj: Michel Denis, Bert Schumann ; korektita de Jacqueline Maussion, Marie-Thérèse Lloancy, François Lo Jacomo ; sendita al XXX, Claude Nourmont, Claude Trésorier, Brian Moon, Guy Martin, Xavier Godivier, Henri Boyet.

Partoprenantoj, kvorumo

555 kunvokiloj por la Eksterordinara Ĝenerala Membrokunveno estis senditaj (123 adresoj de societanoj ne validas); 34 personoj, el tiuj 2 ne-societanoj ĉeestas, 62 prokuroj estis donitaj al ĉeestantoj; ni nombras 148 voĉdonbultenojn senditajn aŭ alportitajn de ĉeestantoj.

Ĉar okazas la dua Eksterordinara Ĝenerala Membrokunveno, tial forestas kondiĉo pri kvorumo.

La sekretario de la Administra Komitato, Jacqueline Maussion indikas ke alvenis 5 petoj de repago de societaj partoj. XXX sendis registritan leteron, li diris ke li intervenos dum la seanco pri ĉiu rilata punkto de la tagordo. Alvenis letero de Jeanne Marie Cash.

Claude Nourmont malfermas la seanon, dankas la societanojn pro ilia ĉeesto kaj konstata ke ilia nombro similas tiun de ordinaraĵaj membrokunvenoj. Ŝi deziras serenajn debatojn.

Societanoj anoncas ke ili volus plenumi kaj doni siajn voĉdonbultenojn post la decidigaj diskutoj dum-seancaj, sed ne antaŭe. François Lo Jacomo pensas ke letera voĉdono okazu nur pri demandoj debatitaj dum la antaŭa Ĝenerala Membrokunveno kaj ke la aliaj tagordaj punktoj voĉdonendaj (ekz. pri la morala raporto) devus okazigi voĉdonon dum la seanco (ĉeestantoj kaj prokuroj), eventuale per sekreta voĉdono. Claude Nourmont aldonas ke la kutimo voĉdoni pri punkto antaŭ ties debato estu pridiskutata.

Rilate la hodiaŭajn voĉdonojn pri la modifoj de la statutoj, François Lo Jacomo precizigas ke nia jura konsilisto informis ke ĉiuj modifoj de la statutoj ekde 1951 validos nur post la jura reguligo (t.e. enskribo en komerca registro) per aprobo en Eksterordinara Ĝenerala Membrokunveno kaj registrado en koncerna ununainstanca tribunalo.

Post peto de Claude Nourmont, la tagordo estas akceptita unuvoĉe.

I) JURA REGULIGO

Esploro de la rezolucio 1 : "Doni mandaton al la administrantoj por procedi al la jura reguligo de la societo"

Societano petas la nunajn membrojn de la Administra Komitato prezenti sin : André Bourdet (kasisto), Jacqueline Maussion (sekretario), Xavier Godivier, Yvette Corvaisier, Brigitte Bourdet kaj Jannick Huet ĉeestas; forestas Dominique Baron, Claude Trésorier kaj Christian Lavarenne.

La du solvoj konsideritaj por la reguligo estas :

1. retroaktiva enskribo en la komerca registro ĉe tribunalo
2. rekreo de la societo necesigante koston de pluraj miloj de eŭroj.

Certaj ĉeestantaj societanoj transdonas sian voĉdonbultenon pri la rezolucio 1 : "La societanoj, eksciintaj pri la kaduka jura situacio de la societo kaj pri diversaj solvoj por reguligo, aprobas ke estu farata ĉio por redoni moralan personecon al la societo." fine de la seanco kaj tiam la voĉdonrezulto estos komunikata.

Esploro de la rezolucio 2 : "La Ĝenerala Membrokunveno konstata la demision de ses el la dek kvin membroj de la Administra Komitato kaj konfirmas le mandaton de naŭ membroj ne demisiintaj, nome: Dominique Baron, André Bourdet, Brigitte Bourdet, Yvette Corvaisier, Xavier Godivier, Jannick Huet, Christian Lavarenne, Jacqueline Maussion kaj Claude Trésorier ĝis la sekva ordinara Ĝenerala Membrokunveno."

Du societanoj, Guy Martin kaj Phil Freslon, rimarkas ke la raporto de la Ĝenerala Membrokunveno de la 16a de majo 2009 ne mencias la eksoficigon de la Administra Komitato kiun ili memoris efektivigita ĉi tiun tagon; François Lo Jacomo respondas ke la vorto "eksoficigo" ne estis uzata en la propono voĉdonita kaj ke la letero de Xavier Godivier enhavis la vorton renovigo. Li aldonas ke la renovigo de la Administra Komitato ene de 6 monatoj, pri kiu li engaĝiĝis, (li estis nomumita, la 16an de majo 2009, animanto de grupo de pensado pri la elekta listo, al kiu aliĝis Lucette Echappé) montris la problemon de kandidatiĝa alvoko al **ĉiuj** societanoj; tiu alvoko estis poŝte sendita kun la kunvokilo al la Eksterordinara Ĝenerala Membrokunveno kaj eblos nur ekde hodiaŭ akiri validan nomliston de kandidatoj por la Administra Komitato, kies elekto okazos dum la sekva Ĝenerala Membrokunveno en majo 2010.

Okazos kompleta renovigo de la Administra Komitato kun 12 membroj laŭ la statutoj de 1951.

Xavier Godivier informas ke li rifuzis aprobi la raporton de la Ĝenerala Membrokunveno sed ke la rezolucio 2 ekzistas por solvi la ambiguecon pri "renovigo" aŭ "eksoficigo".

Esploro de la rezolucio 3 : "Por fortigi la Administran Komitaton kaj bone konduki la juran reguligon, la Ĝenerala Membrokunveno decidis aldoni dekan membron : François Lo Jacomo ĝis la sekva ordinara Ĝenerala Membrokunveno."

François Lo Jacomo indikas ke oni aldonis tiun rezolucion pensante ke li devus esti membro de la Administra Komitato por povi finfari la juran reguligon, sed post la ekspedo da la kunvokilo okazis rendvuo kun la jura konsilisto dum kiu li eksciis ke tio ne necesis kaj ke sufiĉis por li ricevi mandaton de la Administra Komitato por la regulig-peto ĉe la juĝisto.

Laŭ XXX, la nomumo de François Lo Jacomo kiel membro de la Administra Komitato ne estas laŭleĝa.

Brian Moon proponas ke tiu rezolucio 3 estu konsiderata kiel morala subteno por François Lo Jacomo kaj ke la Administra Komitato prijuĝu la nomumon aŭ ne-nomumon de François Lo Jacomo por reprezenti la Administran Komitaton kadre de la jura proceduro, fine Caroline Mauboussin proponas ke la Administra Komitato nomumu François Lo Jacomo konsilisto de la Administra Komitato.

Esploro de la rezolucio 4 : "Mandato estu donita al la Administra Komitato *tiel kompletigita* por procedi al la jura reguligo de la societo kaj por realigi la diversajn demarŝojn ĉe la Registrejo de la Komenca Tribunalo kaj la Registro de la Komerco kaj Societoj." Tiu rezolucio ebligas doni povon al la Administra Komitato por eviti la konsultadon de Ĝenerala Membrokunveno dum la proceduro. Nur la mencio "*tiel kompletigita*" estos forigita.

II) STATUTOJ

Validigi la lastajn modifojn de la statutoj

Esploro de la rezolucio 5 por la artikolo 10 : *membro de la Administra Komitato ne bezonas devige esti franco.*

Marie-France Condé Rey memorigas ke la nomo de la societo origine enhavis "...de la francaj esperantistoj".

La societoj regataj per la franca leĝo devas uzi la francan lingvon en siaj kunvenoj (Brian Moon).

XXX asertas ke juĝisto agnoskas nur la statutojn de 1951 aktualigitajn laŭ la hodiaŭa franca leĝo. Do la rezolucioj 5 kaj 6 ne estos agnoskataj.

Laŭ François Lo Jacomo, nur la modifon de la artikolo 10 oni povos uzi post la jura reguligo, tamen la eksterlandaj membroj de la Administra Komitato devos esti kapablaj kompreni la francan lingvon. Nia diskuto ebligas prepari la statutojn kiuj estos voĉdonitaj per la Ĝenerala Membrokunveno en 2011.

Brian Moon indikas nekohercon inter la artikoloj 13 kaj 15 modifitajn pri la nombro de "reprezentitoj".

Esploro de la rezolucio 5 por la artikolo 11 : *simpligo de la buroo*

Claude Nourmont proponas konservi buroon de *almenaŭ 3 membroj* kaj ne de *nur 3 membroj*. Plue, ekde la Ĝenerala Membrokunveno de 1999 ĝis hodiaŭ ekzistas kolega prezidantaro, la ekzisto de prezidanto meritas diskuton. Xavier Godivier konsideras ke la voĉdono pri la artikolo 11 montros ĉu la societanoj deziras prezidanton aŭ ne kaj ke saĝas uzi "*almenaŭ 3 membroj*" por tiu artikolo. XXX konsideras ke laŭ la leĝo de 1947 nia societo devos nomi respondecan direktoron en la Ĝenerala Membrokunveno 2010. Li aldonas ke li volus direktoraron kiu organiziĝas por nomumi aŭ ne prezidanton kaj ke necesus celi asocion laŭ la leĝo de 1901 kaj ne celi komercan societaron. Li daŭrigas ke kooperativo ne rajtas fariĝi asocio kaj ke laŭ la artikolo 4 de la leĝo, ĉiu staĝano devus esti societano.

Claude Nourmont proponas indiki voĉdonon pri la neceso havi prezidanton. Marie-Thérèse Lloancy memorigas ke en 1999 la prezidanto ne volis reprezentiĝi, la kolega prezidantaro funkciis certan tempon sed la problemoj povintus esti pli akraj kun prezidanto. Claude Nourmont voĉdonigas pri la principo havi prezidanton : 49 por, 7 kontraŭ, 37 sindetenoj.

Esploro de la rezolucio 5 por la artikolo 13 : *neniu societano rajtas havi pli ol 5 prokurojn*

Marie-Thérèse Lloancy atentigas pri la risko ke tia limigo malhelpas societanojn vere esprimi sin donante prokuron al iu fidinda, ĉar tiu prokuro riskas esti konsiderata kiel nevalida – ne eblas scii antaŭe kiom da prokuroj ricevos certa societano, foje eĉ ne eblas scii ĉu tiu fizike ĉeestas. Jacqueline Maussion aldonas ke nia jura konsilisto esprimis dubojn pri tiu ĉi statutŝanĝo. El la diskutado pri la oportuno de tiu modifo rezultas fine la sekvaj ideoj:

La societanoj estos avertitaj pri la maksimuma nombro de prokuroj por 1 persono; la prokuroj povos esti sen nomo kaj partigitaj ekvilibre inter la ĉeestantoj; la prokuroj povas esti donitaj laŭorde je la nomoj de pluraj personoj por trovi taŭgan personon (ĉeestanto kun maksimume 5 prokuroj); la prokuroj sen nomo ne ebligas voĉdoni sed servas por la kvorumo; la interna regularo detaligas la proceduron pri la apliko de la limigo de la povoj indikitaj en la statutoj; utiligi la leteran voĉdonon por la esprimo de ĉiuj societanoj pri la gravaj punktoj; utiligi la leteran voĉdonon por validigi decidon de la Ĝenerala Membrokunveno post tiu-ĉi, ekzemple pri la statutmodifoj.

Esploro de la rezolucio 6 : *La Eksterordinara Ĝenerala Membrokunveno aprobas la redaktaĵon ĉi-ligitan de la statutoj tiel modifitaj.*

La rezolucio ne aplikateblas ĉar validas nur la statutoj de 1951 kaj ĉar la rezolucio 5 servis nur kiel diskutbazo por estonta valida voĉdono pri novaj statutoj post la jura reguligo.

III) SEKVA ĜENERALA MEMBROKUNVENO KAJ RENOVIGO DE ADMINISTRATA KOMITATO

La alvokon je projektoj respondis nur la « projekto pri malfermo » subskribita de Guy Martin, Xavier Godivier, Jannick Huet, Denis-Serge Clopeau, Bert Schumann kaj Claude Trésorier. La leteroj ricevitaj de François Lo Jacomo ne aperigis diversajn proponojn kaj laŭ li eblas sintezo kun kandidatiĝoj nur personaj per individua sinprezento. Jannick Huet protestas ke necesas klare prezenti al la societanoj liston de personoj dezirantaj kune labori kun la samaj bazaj celoj por la estonteco de la Kulturdomo ĉar la hodiaŭa kriza situacio ligiĝas kun la problemo de kohereco de la teamo establita en 2008. Necesas fronte ataki la problemon pri la profit-doneco (rentabilitato) de la Kulturdoma administrado por certigi bonan prizorgadon de la Greziljona bieno. Claude Nourmont proponas ke ĉiu kandidato devas indiki sian projekton en sia sinprezento. Guy Martin signalas ke le projekto pri malfermo ne estis sendita kun la kunvokilo kiel tion petis ĝiaj subskribintoj kaj ke oni notu la ekziston de alia opcio, ja FEM (Feminista Esperanta Movado) sendis du leterojn al la membroj de la Administra Komitato, unue pri longdaŭra luo, poste pri aĉeto nur de la kastelo; do ne ekzistas interkonsento! François Lo Jacomo precizigas ke tiu propono venanta el alia asocio ne rilatas la elekton de la Administra Komitato. Se ĝi daŭras kaj se ĝia dosiero estas sufiĉe solida, tiam la Administra Komitato devas meti ĝin en la tagordon de posta Ĝenerala Membrokunveno. Guy Martin plie signalas ke alvoko estis sendita al la francaj Esperanto-asocioj por diskuti pri la estonteco de la kultur-domoj. Krome, la asocioj, kiuj estas societanoj kiel moralaj personoj, devus rajti kandidatiĝi por la Administra Komitato (reprezentanto de la asocio ĉeestus la Administran Komitaton). Fine, dum la kongreso de SAT-amikaro en Hiliono, debato pri la estonteco de la francaj esperantistaj kultur-domoj okazos dimanĉon, la 4an de aprilo 2010. François Lo Jacomo konsideras ke la

komenco de la projekto pri malfermo estas polemika sed ke oni konsentas pri sufiĉa nombro da punktoj el tiu projekto pri malfermo, t.e. domo malferma dum la tuta jaro kaj ne nur por Esperanto. Li aldonas ke la aĉetopropono de FEM ne estas kredinda kaj ke se ĝi iĝas tia, ĝin debatos la Ĝenerala Membrokunveno. Li anoncas sian partoprenon en la debato dum la SAT-amikara kongreso, certe necesas pristudi la funkciadon de ambaŭ kultur-domoj. Claude Nourmont ne kontraŭas debaton pri la kultur-domoj dum la kongreso de Espéranto France (en Kaiserlautern je pentekosto). Xavier Godivier precizigas ke la temo estu debatita dum la sekvataga Administra Komitato de UFE. Punkto pri la farendaj laboroj kaj ilia kosto apartenas al la tagordo de la sekvataga Administra Komitato de la KulturDomo. Marie-France Condé Rey atendas la respondon al la aĉetopropono post la jura reguligo de la KulturDomo. Marie-Thérèse Lloancy certigas ke Greziljono ne vendeblas kaj ke la asocioj povintus helpi la KulturDomon antaŭ dek jaroj ! François Lo Jacomo pensas ke kandidatiĝo de morala persono sen mencio de identeco de fizika persono ĝin reprezentanta en la Administra Komitato malfacile eblas – ĝi ne nur kontraŭdiras la statutojn laŭ kiuj la membroj de la Administra Komitato devas posedi siajn civilajn kaj politikajn rajtojn. Sed krome, la civila stato de administranto reprezentanta moralan personon devas esti eksplicite deklarita en la komerca registro laŭ konsulto nur de la elekta raporto, kaj ĝi devas esti konata ekde la elekta rezulto ĉar la Administra Komitato unuiĝas tuj poste por elekti la Buroon, tio ebligas al la asocio tiel elektita pridiskuti intertempe. Se la asocio ŝanĝas sian reprezentanton dum la mandato, tio implikas oftan redistribuon de la taskaj ene de la Administra Komitato, kaj se ĝi ne ŝanĝas sian reprezentanton, kial do voli nepre kaŝi la nomon de tiu reprezentanto al la elektantoj? Oni povus antaŭvidi ke asocioj estu laŭleĝaj membroj, do elektas siajn reprezentantojn sen baloto, kiel tion oni faras aliloke: tio nun ne eblas kaj tio ne esceptas la nomitajn asociojn sciigi la nomon de sia reprezentanto antaŭ la voĉnombrado.

Sekvas diskuto por trovi proceduron por tiuj elektoj. Por kunordigi elektoproceson, Bert Schumann proponas sin (estante germano li ankoraŭ ne elekteblas por la sekva Administra Komitato) poste Henri Boyet. Voĉdonigo: 0 kontraŭ, 14 sindetenoj (el 3 ĉeestantoj), adoptita unuvoĉe.

Proceduro :

1. ekspedo de la kandidatiĝaj aktoj kaj de la subskribitaj projektoj kiuj estos transdonitaj al la deklaritaj kandidatoj plej malfrue la 15an de marto 2010
2. ekspedo de la personaj sinprezentoj por ĉiu kandidatiĝo antaŭ la 31a de marto 2010

Voĉdonigo : 1 kontraŭ; 4 sindetenoj, proceduro adoptita per plimulto.

La 30a de aprilo estas la dato fiksita por la ekspedo de la kunvokiloj al la Ĝenerala Membrokunveno (la proponita dato estas la **29a de majo** 2010) kiuj enhavas

- la raportojn (moralan kaj financon)
- la projektojn kaj sinprezentojn (en la franca kaj en Esperanto) de la kandidatoj al la Administra Komitato por dek du postenoj provizendaj

la voĉdonbultenoj por la elekto al la Administra Komitato, la raporto morala kaj financa kaj la aliaj punktoj de la tagordo estos diskutataj kaj voĉdonitaj dum la seanco de la Ĝenerala Membrokunveno. La ne-ĉeestantaj societanoj sendos sian prokuron.

- la rezulton de la peto pri jura reguligo.

La kandidatoj kiuj estis elektitaj per la Administra Komitato de 2008 kaj kies mandato devintus finiĝi en 2012, estas petataj skribi leteron por oficialigi sian mandatredonon.

Por la eventuala kandidatiĝo de asocio oni precizigas ke kandidato estos fizika persono kaj ke tiu reprezentos la asocion.

IV) DIVERSAJ DEMANDOJ

Jacqueline Maussion prezentas la programon 2010 :

- 4 semajnoj de someraj staĝoj
- rezervitaj semajnfinoj
- staĝo de Christian Rivière de la 27a de aprilo ĝis la 1a de majo
- luo de Elisabeth Barbay pour Fringoj (ndlr: Fringoj estis nuligita post la Eksterordinara Ĝenerala Membrokunveno)
- luo de François Lo Jacomo por Animath (konfirmenda)

François Lo Jacomo informas pri somera projekto de tradukado de tekstoj de Privat kaj aliaj projektoj ankoraŭ ne definitivaj kaj proponas promocian politikon de la someraj staĝoj prezentataj en la diversaj naciaj kaj regionaj kongresoj.

Jannick Huet-Schumann proponas oferton alternativan al la kursoj de 1a, 2a, 3a grado por la somero.

Diratas ke Dominik Bertrand, kiu redaktis "Kulturaj Kajeroj"-n, ne certigis ke li daŭrigos en 2010, necesas kuraĝigi lin.

Marie-Thérèse Lloancy proponas atribui al salono de la kastelo la nomojn de gesinjoroj Micard kaj al la biblioteko la nomon de Jeanine Vincent kaj organizi inaŭguron. Voĉdonigo: 0 kontraŭ, 1 sindeteno.

REZULTOJ DE LA VOĈDONOJ el 148 bultenoj

rezo-lucio	jes	ne	sinde-tenoj	blankaj + nevalidaj
1	133	2	7	6
2	124	7	9	8
3	120	8	13	7
4	130	5	6	7
5-1	108	18	15	7
5-1'	109	13	15	11

Rezo-lucio	jes	ne	sinde-tenoj	blankaj + nevalidaj
5-2	100	25	16	7
5-3	112	15	14	7
5-4	95	26	19	8
5-5	110	13	18	7
6	105	20	11	12

Fermo je 19h40